# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Aprilo : 2 2022

## AMARA KONDAMNO PRO DOLĈA DELIKTO

Laŭ ĵusa juĝo de la Supera Kortumo de Kanado, Richard Vallières devos pagi mon-punon de 10 milionoj da kanadaj dolaroj, kiel aŭtoro de la plej granda ŝtelado en tiu nordamerika lando. Vallières ŝtelis 2.700 tunojn da acero-siropo. Se li ne pagas tiun mon-kvanton en 10 jaroj, li devos resti dum 6 pliaj jaroj en malliberejo.

La plej fama ŝtelo en la kanada historio eĉ estis la argumento por *Netflix*, kiu produktis filmon pri tiu historio. En la jaro 2011, Richard Vallières rimarkis, ke la Kebeka Federacio de Produktistoj de Acero-Siropo tenis en stoko milojn da tunojn de tiu dolĉa substanco ĉe grandega staplo. Tiam li, kun la helpo de dudeko da kunlaborantoj, ŝanĝis la enhavon de preskaŭ 10.000 el tiuj bareloj per akvo. Tiun agado oni eltrovis en la jaro 2012.

Post monatoj da enketo, kanada polico arestis al Vallières kaj al pliaj 20 homoj, kiel respondeculoj de tiu friponaĵo. Oni eltrovis, ke la produkto estis disvendita en Usono kaj Kanado.



Acero-siropo estas dolĉa substanco farita de la arbsevo de sukeracro

Dum la proceso oni kalkulis, ke Vallières gajnis, per tiu trompa negoco, pli ol 10 milionojn da kanadaj dolaroj. La unua juĝo kondamnis lin al pago de egala mon-kvanto aŭ 7 jaroj da malliberigo, se li ne povis pagi tion.

En dua instanco, la Supera Kortumo de Kebekio malpliigis tiun mon-punon al 800.000 dolaroj. Tamen, post apelacio, la Supera Tribunalo de Kanado denove pliigis la pagotan mon-kvanton ĝis 10 milionoj da dolaroj. Se la kondamnito ne pagas tiun kvanton en 10 jaroj, li devos resti en malliberejo dum 6 jaroj.

# Vorto de la Semajno

**Antecedentoj:** Tuto de la antaŭa konduto de persono; ies pasinta vivhistorio.

**Krim-antecedentoj:** antecedentoj rilataj al krimuloj pro ties agadoj.

Krim-antecedentoj ne povas ekzisti por-ĉiame, tiel, ĉiu nacia leĝaro determinas kiam kaj sub kiaj kondiĉoj ili devas esti nuligitaj.

Sinonimoj: *precedencoj, vivhistorio, antaŭaĵoj, praaj dosieroj.*

*La akuzito havis malbonajn antecedentoj kaj tio influis la juĝistan decidon.*



Dosiero enhavanta la policajn antecedentojn de usona ĉefo de la organizita krimo *Al Capone*.
Jaro 1932

## JAM APERIS LA 20-a NUMERO DE *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Dum ĉi tiuj tagoj Vi ricevas la komputilan version de la numero 20-a de *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Kiel dirite, tiuj membroj de la asocio kiuj jam petis paperan version, baldaŭ ricevos ĝin, kune kun la antaŭa numero 19-a. Ni esperas, ke ĉi tiu numero plaĉos al Vi. Ni jam estas malfermitaj al la ricevo de kunlaboraĵoj por la 21-a numero, aperonta en la monato julio 2022.

jurista@esperanto.ac